

19491/29

(1964)

januaro 1964



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

29-a jaro, n-ro 1-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O. Jara abono por ne-membroj: gld. 3,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

ĈU ONI DEVAS AMUZI VIN?

Okazis foje en intima festena rondeto, ke unu el la rondaninoj sciigis kiel sian opinion, ke oni por sufiĉa distrado minimume unufoje ĉiusemajne bezonas aŭskulti koncerton aŭ rigardi teatraĵon, balledon aŭ alian spektaklon. Ke la ŝercmoka demando „Ĉu oni devas vin amuzi?“, kiun ĝi elvokis, kaŭzis en la rondeto iom da konsterniĝo, ni povas lasi sen plua konsidero.

Vi tamen eble demandas, ĉu la celita moka dirajo concernas al ni. Mia respondo estas: „Iel, mi kredas, ke jes“. Ŝajnas, ke parto de niaj membroj konsideras la membrecon de tute serioza movado, kiu postulis ĝis nun kaj sendube dum longa tempo estonten ankoraŭ postulon ĉies forton kaj daŭran streĉadon . . . Ŝajnas, ke parto konsideras ĝin afero taŭga por persona amuziĝo. Ho, certe! ili regule pagas sian kotizon, sed tamen . . .

Okaze de la jarŝanĝiĝo oni ofte faras kelkajn konsiderojn; rigardas returnen por konstati esperitajn progresojn aŭ bedaŭri malsukcesojn, preta por akcepti la instruojn de la konstatoj kaj apliki tiujn instruojn estonte praktike. Estas klare, ke, se oni deziras fari tion efike, la preteco al akcepto de certa kvanto da sinkritiko estas kondiĉo.

Ni do konsideru. Kion? Kiel?

Ni nepre unue interkonsentu, ke la asocio kaj la sekciaj estraroj, kiam ili por certa venonta tempo planadas la agadon,

atendas - kaj rajtas atendi, ne! pli: devas atendi - ke ĉiu membro partoprenos laŭpove en la aktivecoj kaj atentos la petojn kaj indikojn. Sur tiu bazo ni do simple konsideru, ĉu la grado de nia partopreno - laŭ niaj personaj povoj - en la asocia kaj sekcia agadoj estis sufiĉa kaj ni, honestaj kaj sinceraj, donu la respondon al ni mem.

En ĉi tiu konsidero nur unu afero estas nedisputebla antaŭkondiĉo: nia forta kaj senŝancela kredo pri la ĉefa bazo de Esperanto kaj ĝia neŭtrala movado. Tio estas: pri la granda idealo, tiu 18-jarcenta invento pri libereco, egaleco kaj frateco inter ĉiuj homoj kaj popoloj, el kiu D-ro Zamenhof dum sia tuta vivo ĉerpis siajn ŝajne ne-elĉerpeblajn forton kaj kredon. Invento, sur internacia tereno unue klare kaj komplete esprimita de la nuntempa supernacia aŭtoritato de la Unuiĝintaj Nacioj en la „Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj“. Antaŭ nur kelkaj semajnoj vi povis atesti pri tiu nia idealo, atentigante kune kun viaj samideanoj pri la 15-jara ekzistado de la nomita Deklaracio. Ĉu vi ĉeestis tian kunvenon por atesti pri via kredo en mondo por ĉiu egalrajta?

Kara samideano, regule vi ricevas ĉi tiun asocian gazeton. Mi scias: kelkfoje ĝi enhavas tiel tedan artikolon, kia estas ĉi tiu. Sed cetere troviĝas en ĝi ankaŭ la raportoj el la sekcioj kaj la komunikoj de via asocia estraro kaj krome - ofte eĉ

sprita - lingva artikolo. Sed mi kompreneble ne bezonas paroli pri nia asocia gazeto. Mi estas certa, ke vi literumas ĝin dekomence ĝisfine.

„La sekcio”, diras Prof. I. Lapenna, la ĝenerala sekretario de U.E.A., „estas la bazo de la Esperanto-movado”. Estas do logike, ke la laborplanoj de U.E.A. kaj de L.E.E.N. (kaj eble ankaŭ de iu aŭ alia sekcio) baziĝas sur la forto de la sekcio, la loka klubo.

Kaj prave! La loka klubo estas la centro, la renkontiĝejo por la lokaj adeptoj de la internacia lingvo. En la klubkunvenoj la membroj regule kaj efike povas ekzerci Esperanton. Tiuj kunvenoj, akceptante eksterlandajn gastojn, anstataŭas, reprezentas la tutan mondon. Cetere, ili estas la lokoj, kie vi povas pritrakti kaj diskuti la organizajn demandojn. La kunvenoj de la loka klubo, unuvorte, estas la hejmo por la familio esperantista. Ilia valoro oni apenaŭ povas trotaksi.

Kaj - fine, sed ne laste - ili estas la lokoj, kie vi per prelego aŭ alia plej simpla reala kunlaboro povas montri al dankaj sekcia estraro vian pretecon helpi ĝin en ĝiaj ofte penaj klopodoj daŭre aranĝi bonajn klubkunvenojn.

Por gvidi kaj direkti la organize necesajn kaj deziritajn laborojn via asocio en la daŭro de la pasinta jaro akceptis laborplanon. Sufiĉe grava verkaĵo, kiu indikas grandan aron da aktivecoj - tiel tiajn, kiajn vi devas fari kune, kiel ankaŭ tiajn, kiajn vi povas entrepreni sola. - Bonvolu iom studi la laborplanon kaj inter la aktivecoj en ĝi indikitaj vi certe trovos taskon, kiu plaĉas al vi.

Kompreneble, sendube vi senprokraste plenumis tiajn etajn petojn de via estraro kiam prezentas - ekzemple - la kompletigado de la kartoteka demanfolio . . .

Pardonu? - Kion vi diras?

Ĉu vi ne scias pri la kartoteko, ne vizitis la solenan Zamenhofan kunvenon? Ĉu vi volas kredi ĝin min, ke vi apenaŭ trafolumas la asocian gazeton kaj ĝenerale vizitas nur tiujn klubkunvenojn, en kiuj estas prezentata amuzajo aŭ en kiu la klubo akceptas eksterlandan? Se estas eble tiel, ĉu vi konsentas, ke por vi validas la demando en la komenco citita?

Kara samcelano, certe ardas en vi ankoraŭ la Interna Ideo; certe ankaŭ vi volonte donas al la asocio kaj la sekcio laŭpove viajn fortojn. Sendube en via

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Den Haag de L.E.E.N.

Sekr.: van Trigistraat 20.

La 13an de novembro ni havis interesan vesperon. Diversaj eksterlandanoj ĉeestis kaj parolis. Nome:

s-ro Calado, Portugalio, jam 6 jarojn ĉi tie,
s-ro Rakower, Polo, tre longe ĉi tie,
s-ro Sadler, Anglio, nur 1 jaron ĉi tie,
s-ro Schmidt, Germanio, 4 jarojn ĉi tie,
s-ro Jung, Germanio, 20 jarojn ĉi tie.

Estis vigla interparolado kaj ni spertis, ke ili havas multan kritikon pri Nederlando kaj nederlandaj kutimoj. El iliaj esprimoj, ni konkludis, ke ili ne sufiĉe konas Nederlandon aŭ sopiras al la patrio kaj suferas pro tio. Grandan parton de la vespero ili preparolis la manĝadon. Ni povas diri: kiaj landoj, taj kutimoj. Atentu la kunvenojn en januaro: la 22an la jarkunveno, la 29an la kontaktvespero de la Posthoornkurso. Venu grandnombre!!!

La 27an de novembro ni kunvenis en nia nova konversaciejo, Valkenboskade 520.

Ĉeestis bedaŭrinde nur malmultaj anoj. En nia mezo estis sinjoro G. Pompilio, kiu donos ĉi tiun vintron por ni perfektigan kurson.

Ni esperas, ke la sekvontan fojon ĉeestos pli multaj!

Sinjoro H. Valkenburg informis nin pri la „Posthoorn-kurso”. Estas nun 268 partoprenantoj kaj regule anoncas sin novaj. Por la kontaktvespero, kiu okazos la 29an de januaro jam 69 personoj aĉetis kartojn.

Poste nia prezidanto, sinjoro H. Kerfers, proponis aktualan temon por dis-

koro aŭdiĝas ankoraŭ el nia ligokanto:

Per konstanta klopodado,
per laboro energia,
Ni atingos nian celon:
La estonto estas nia!

Tial via estraro, dezirante al ĉiuj anoj persone, tiel ankaŭ al iliaj familioj, en la nova jaro feliĉon kaj prosperon, celkoncacia kaj venkocerta alvokas vin:

Vi kun ni antaŭen marŝu:
La estonto estas nia!

Tj. Boersma.

kutado, nome: la mistero ĉirkaŭ la murdatato al la usona prezidinto John F. Kennedy.

Ni havis interesan kaj lernigan vesperon kaj la neĉeestintoj malpravis.

I. D.-L.

Sekcio „Merkurio”, Rotterdam.

Mortis C. Kromziek.

Post doloriga kaj longtempa suferado mortis la 30-an de novembro 1963-a samideano Christiaan Kromziek. Li havis 66 jarojn. Ĉar la malsaneco iom post iom pligraviĝis ek de la milito, Kromziek ne povis en la postmilita tempo aktive partopreni en la laboro por Esperanto. Amiko Kromziek devenis el la konata skriba kurso de Nimego kaj estis dum multaj jaroj sekretario de la Roterdama Esperanto-Societo „Merkurio”. En tiu tempo li estis speciale aktiva en la hungara entrepreno „Literatura Mondo” en Budapeŝto. Vilmas Bleier tiam loĝis ĉe li. Li ankaŭ partoprenis diversajn internaciajn kongresojn.

La malnovaj samideanoj certe memoros liajn bonan humoron kaj kameradecon kaj liaj korespondintoj sendube konservos agrablan memoron al tiu simpatia amiko.

La ripozu en paco.

J. D. B.

S-ro D. E. Schipper, Hilversum, eknomita organisto en Blaricum.

Post kompara ekzameno nia blinda samideano s-ro D. E. Schipper el Hilversum estas eknomita organisto de la Reformita Preĝejo en Blaricum.

Ni kore gratulas nian samideanon, kiu ekde aŭgusto de la pasinta jaro denove laboras ankaŭ ĉe la radiodisaŭdigo.

Lia eknomo estas granda sukceso post la malfacilaj jaroj sekvintaj lian revenon el Indonezio en 1956.

(laŭ „De Blindenbode” de nov. 1963).

Manuskriptojn por Nederlanda Esperantisto, prefere unuflanke tajpitajn kun larĝa marĝeno, ni akceptas ĝis la 10-a de la antaŭa monato. Post tiu dato ni ne plu povas akcepti ion.

La Redaktoro.

ASOCIAJ INFORMOJ.

ATENTU

GRAVE

LIBRO-SERVO L.E.E.N.

La prizorgantino de la Libro-Servo L.E.E.N., kiu dum multaj jaroj plenumis tiun taskon, sciigis al mi, ke ŝi post serioza pripensado decidis demeti sian funkcion. Kompreneble la ĉefestraro tuj ekcerbumis pri anstataŭont(in)o. Ĝi esperas, ke troviĝas inter la membroj persono, kiu estas preta transpreni la gvidadon de nia Libro-Servo. Kiu havas iom da tempo kaj iom da spaco kaj volas transpreni ĉi tiun interesan laboron? Bonvolu kiom eble plej baldaŭ sciigi al mi vian nomon aŭ peti informojn ĉe s-ino Mabeoone, kiu ĉiam estas preta informi vin pri la laboro.

W. P. Lok-van Putten, sekr.

Esperantoglasoj.

Kelkaj Utreĥitaj Esperantistoj intencas denove vendi glasojn, nun kun la bildo de d-ro Zamenhof en la koloroj nigra kaj blanka. La glasoj kostas po gld. 1,— (plus afranko 1 glaso 45 cd., 2 aŭ 3 gl. 60 cd.). La gajno estos por la estonta Zamenhof-monumento en Utreĥto. La glasojn vi povas mendi ĉe s-ro D. Goslinga, Maliestraat 11, Utreĥto; ĝirkonto n-ro 53 77 31.

Korekto.

En la decembra n-ro de „N.E.” 1963 estas sur paĝo 111-a en la 2-a kaj 3-a linioj de la dekstra kolono la indiko: Fryslân (pr.: frislôn kun la ô de Rhône).

S-ro W. Grolleman, la antaŭa redaktoro de „N.E.”, afable atentigis, ke tio signifas, ke Fryslân rimus kun la nederlanda vorto „zoon”, ĉar la francoj prononcas la rivernomon kun fermita o, do ro:n. Mi devas konfesi, ke mi kiel multaj nederlandanoj prononcas tiun rivernomon mise kun malfermita o kiel ankaŭ la vortojn „rose”, „kontrolle” kaj „zone”. Nu, en „Fryslân” sonas tiu en Nederlando misprononcata ô de Rhône! Dankon al s-ro Gr. pro la instrua rimarkigo kaj laŭdo.

S. S. de JONG Dzn.

4

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ.

49-A UNIVERSALA KONGRESO ESPERANTO KULTURDOMO. DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 aŭgusto 1964.

Sub la Alta Protektado de Ŝia Moŝto
Juliana, Reĝino de Nederlando.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Poŝtêkkonto: 378964. Tel.: 32788.

OFICIALA KOMUNIKO.

N-ro 4-a.

Rotterdam, la 23-an de nov. 1963.

Novaj Kotizoj. Ekde la 1-a de januaro
1964 validas jenaj novaj kotizoj:

Kongresano	50,—	ned. gld.	(200 st.)
Edz(in)o	25,—	ned. gld.	(100 st.)
Junulo	19,—	ned. gld.	(76 st.)
Studento	31,—	ned. gld.	(124 st.)
Blindulo	25,—	ned. gld.	(100 st.)

Neaktitaj aliĝoj. Ĉe la administracio de
la Kongreso troviĝas pluraj aliĝiloj ne-
traktitaj pro la absolute nelegeblaj nomoj
sur ili. Por eviti tion ni varme konsilas al
ĉiu aliĝonto kiel eble plej klare (prefere
tajpe aŭ preslitere) skribi sian nomon kaj
adreson.

Foto-konkurso. En kunlaboro kun la
20-a Internacia Junulara Kongreso kaj
kun la firmo Gevaert, la 49-a U.K. oka-
zigos Internacian Foto-Konkurson. La
temo de la konkurso estas el la konata
„Taglibro de Anne Frank”: „Letero
15/6/1944 - Freneze mi amas la natu-
ron, ĉu nur pro tio, ke dum longa tem-
po mi ne povis elŝovi la nazon eksteren?”
Por la gajnintoj de la konkurso estas
antaŭviditaj pluraj premioj, i.a. foto-
aparato.

Ĝis 22/11/1963 aliĝis entute 722 per-
noj el 28 landoj.

G. G. Pompilio,
Konstanta Kongresa Sekretario.

BELARTAJ KONKURSOJ.

Pro la eksiĝo de s-ro W. Auld la Estraro
de U.E.A. nomis s-ron E. P. Ockey, 15
Upper Pines, Woodmansterne, Banstead,
Surrey, Anglujo, kiel sekretarion de la
„Belarta Konkurso de UEA 1964” (vidu
„N.E.” de dec. 1963-a, pĝ. 102); oni do
ne plu turnu sin al s-ro Auld, sed al s-ro
Ockey.

Kastelo „Grésillon”
BAUGÉ (M.-et-L.)
(Francujo).

Programo aranĝoj en 1964.

DUM LA PASKA LIBERTEMPO

Alventago: la 1-a de aprilo;
Forirtago: la 8-a de aprilo

KULTURA SEMAJNO

gvidata de s-ro Llech-Walter, pre-
zidanto de U.E.F., kun partopreno
de elstaraj prelegistoj.

DUM LA SOMERO

Antaŭ la 30-a de junio estos eble
akcepti grupojn eĉ ne-esperantistajn
por pli-malpli longaj periodoj.

UNUA PERIODO:

Alventago: la 2-a de junio;
Forirtago: la 19-a de julio

INTERNACIAJ KULTURAJ KAJ TURISMAJ FERIOJ

La detala pragramo estos baldaŭ preta.

DUA PERIODO

Alventago: la 19-a de julio;
Forirtago: la 9-a de aŭgusto
Preparado por Tri Ekzamenoj

TRIA PERIODO

Alventago: la 9-a de aŭgusto;
Forirtago: la 30-a de aŭgusto
Kulturaj Esperantaj Semajnoj
Tri Esperanto-kursoj
Kursoj pri bindado kaj korbifarado
Kantoj
Dancoj
Ekskursoj

KVARA PERIODO

Alventago: 30-a de aŭgusto;
Forirtago: la 13-a de septembro.
ESPERANTO-KURSOJ
organizitaj de U.E.F.

Je la fino de ĉiu periodo (krom la
dua) okazos ekzamen-sesioj.
Dum ĉiu periodo okazos gvidataj
ekskursoj al diversaj vidindaĵoj, ĉe-
fe al la Loire-Kasteloj kaj al la mi-

ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE.

Jaarverslag 1963.

De commissie bestond in dit jaar uit de
volgende leden:

Voor F.L.E.: mej. A. C. Obbes, mevr.
E. Burgler-Jezsó, dhr.
J. Ph. Punt.

Voor L.E.E.N.: mej. H. M. Mulder, de
heren F. Weeke en drs.
F. Oudewetering.

Voor N.K.: de heren G. Ellerman,
J. S. Jansen en G. J.
Kocx.

Voor K.N.U.E.: de heren J. U. Hommes,
H. A. de Hoog, R. van
Spronsen.

Voorzitter: H. A. de Hoog.

Secretaris-pennigm.: mej. H. M. Mulder.

Gedelegeerde van de Minister van O.,
K., en W.: dr. J. M. van Buytenen.

Er was, zoals steeds in de laatste jaren,
slechts één examen, en wel op dinsdag
4 juni in de Rijks-H.B.S. te Amersfoort.

Examinatoren waren: de dames Ob-
bes, Burgler en Smit, en de heren: Bra-
kei, Ellerman, Jansen, Punt en v. d. Ou-
dewetering.

Overzicht:

	Aangem.	Opgek.	Geslaagd
Examen E	24	24	19
Examen M	22	22	17
Examen S	2	1	1

De heer Faulhaber achtte, met het oog
op zijn leeftijd en gezondheid, de tijd ge-
komen, het voorzitterschap neer te leg-

rinda nokta spektaklo en Le Lude.
Estas konsilinde rezervi ĉambrojn
sufiĉe frue.

La detalaj programoj aperos ko-
mence de 1964.

Abonu la Revuon eldonitan de la
E.K. „Kulturaj Kajroj”.

Informoj kaj aliĝoj:

ESPERANTISTA KULTURDOMO,
Kastelo Grésillon, BAUGÉ
(M.-et-L.), Francujo.

gen. Er werd op hartelijke wijze afscheid
van hem genomen. Het is niet gemakke-
lijk in kort bestek uit te drukken, wat
de heer Faulhaber voor de Esperanto-
examens in Nederland betekend heeft.

Ook in dit verslag wil de commissie
hem nog eens in het openbaar bedanken
voor zijn vele en veelzijdige werkzaam-
heden.

Enkele opmerkingen over de resulta-
ten van dit jaar:

E-examen: Er was vaak een opmerkelijk
verschil tussen het mondeling en het
schriftelijk examen. Terwijl op de meeste
taalexamens de schriftelijke vaardigheid
groter is, liggen de verhoudingen hier
precies omgekeerd.

Vooral de vertaling in het Esperanto
leverde dikwijls slechte resultaten op,
maar ook de vertaling uit het Esperanto
gaf vaak blijk, dat men veel te weinig
Esperanto leest, met als gevolg daarvan
een zeer gebrekkige woordkennis.

De ouderwetse methoden, waarbij een
bepaalde vocabulaire stelselmatig geme-
moriseerd en gerepeteerd werd, hadden
toch zeker wel hun goede zijden!

M-examen: Over de hier behaalde resul-
taten kan de commissie over het alge-
meen tevreden zijn. Er was zelfs geen
enkele onvoldoende voor het onderdeel
grammatika. Ook hier is de vertaling
Nederlands-*Esperanto* het knelpunt.

Hierbij was het opvallend, hoe vaak
de kandidaten zich met een omschrijving
moeten behelpen, daar zij een te geringe
woordkennis hebben.

Hoewel deze wijze van vertalen soms
van veel originaliteit blijk geeft wat be-
treft de handigheid, waarmee een uitweg
wordt gevonden, ontstaat toch een vlak,
ongenuanceerd *Esperanto*.

De kennis van de gelezen boeken kan
slechts matig genoemd worden.

S-examen: Uit der aard der zaak kunnen
hierover dit jaar geen opmerkingen ge-
maakt worden, daar er maar één candi-
daat was, die met een goede lijst slaagde.

Het is te betreuren, dat het aantal can-
didaten, na de stijging van verleden jaar,
weer zo sterk teruggelopen is.

H. A. de Hoog, voorzitter.

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

TRA LA LIBRARO.

„KONTAKTO”. *Organo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (Junulara Sekcio de U.E.A.). Provnumero. N-ro 1-a, Somero 1963. Eld. „Kontakto”, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando. Prezo: individua numero gld. 2,20. Jarabono gld. 8,— (32 steloj).*

En sia enkonduka artikolo la redaktoro Humphrey Tonkin (Usono) diras, ke en la lastaj jaroj TEJO akiris novan reputacion kaj en diversaj landoj la naciaj TEJO-bultenoj jam atingis laŭ enhavo sufiĉe altan nivelon; i.a. li mencias „Tamen” de la pola junularo.

La internacia junulara organizo havis apartan rubrikon en „Esperanto”, sed mankis ĝis nun propra internacia organo. Kaj nun aperis la unua numero de „Kontakto”, kiu laŭ la redaktoro donu al TEJO karakteron kaj montru, „ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo”. Oni intencas aperigi en „Kontakto” ne nur artikolojn kaj informojn pri Esperanto, sed ĉefe artikolojn de ĝenerala intereso por la junularo. Tio ŝajnas al ni sana koncepto. En la Esperantista gazetaro aperas tro malmulte da artikoloj pri ne speciale Esperantistaj temoj.

Bonaj specimenoj de tiaj artikoloj de ĝenerala intereso estas en ĉi tiu numero, ekz. „Eduka progreso de la nova Nigrio” de Anthony Abe, kaj „Pensoj pri nigerio edukado” de Sam Apeji.

Krome ni mencias „Needzinaj patrinoj: usona socia problemo” de Katharine Chaplin (sufiĉe supra pritrakto de grava problemo) kaj „Esperanto kaj la azia junularo” de Armand Su. Bonaj fotoj ilustras ĉion.

Ni deziras multan sukceson al ĉi tiu bonaspekta revuo.

H. G.

La konata dana firmao *Plumrose* eldonis broŝuron en Esperanto. Temas pri 8-paĝa broŝuro pri Smørrebrød (danaj sandviĉoj). La broŝuro estas multkolora kaj eksterordinare bela.

Oni povas senpage ricevi la broŝuron, se oni skribas al: Plumrose, St. Annae Plads 26, Köbenhavn K. Por eviti erarojn, bonvolu substreki, ke temas pri la ESPERANTO-eldono de la broŝuro „Smørrebrød”.

Parolas la legantoj.

(ekster respondeco de la redakcio).

Literaturaj pripensoj.

Antaŭ kelka tempo mi legis modernan libron, verkitan de la franca aŭtoro Elie Wiesel. La titolo nomiĝis: „La tago”.

Kio estis la intenco de la verkisto? Laŭ mi li volis diri: Homo, vi devas pensi ne nur pri vi mem, sed antaŭ ĉio pri tiuj, kiuj amas vin!

La ĉefpersono estas judo, kiu travivis la mizerajn tagojn en la germanaj koncentrejoj dum la dua mondmilito, Li perdis tie siajn patrinojn, patron, fratineton kaj avinon, kiujn li tre amis. Kiam la malfeliĉulo estis liberigita de la okcidentaj venkintoj, li ankoraŭ vivis. Baldaŭ li resaniĝis korpore, sed li memoris tro multe pri la mortintoj. Pro terura trafikakcidento oni transportis lin al malsanulejo.

La amo de lia amikino kaj la kamaradeco de lia hungara amiko estis la sanigiloj por la spirita krizo de la ĵurnalisto.

La tempo forpasas. Oni devas ne ĉiam pensi pri la krimoj, kiuj okazis dum la epokoj al homoj, kiuj trankvile vivis kaj tute senkulpaj estis, kiam la katastrofo venis. Estas do kompreneble, ke la homoj perdas la kuraĝon kredi al grandiozaj idealoj, al la frateco inter la homoj, al religioj, kiuj promesas animkvietecon al la vivantaj homoj kaj animriponon al la mortintoj. Sed oni ne havas la rajton fermi siajn okulojn por la vero, ke en la estonteco la mondpaco venos! Malgraŭ la ĉiutagaj anoncoj en la ĵurnaloj, radio, filmoj, televido, oni devas kredi, ke ni ĉiuj ne estas bestoj, sed kreitaĵoj, kiuj ricevas la kapablecon de Dio, *mem* labori por pli bona mondo!

Kafka, Nietzsche, Schopenhauer estis grandaj talentplenaj germanaj aŭtoroj kaj filozofoj, sed ili estis pesimistoj, kiam ili pensis pri la estonteco de nia tero. Pli volonte mi nomas Goethe, la plej grandan verkiston kaj poeton, kiu kreis „Faŭston”, en kiu li kantis pri sia konvinko, ke la pura amo de la germana knabino „Gretchen” venkis la delogon de la diablo. Ankaŭ la puraj idealoj de d-ro Zamenhof venkos la materialistajn dezirojn de la homoj en ĉi tiu tempo!

Hilversum.

A. Put.

ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE

Amersfoort, 4 juni 1963.

S 1.

Ter vertaling. Tijd: 2 uren (tezamen met mondeling van 2—5 uur).

Kelkaj al ni riproĉis, ke ni faras literaturon en Esperanto, aliaj, ke ni literaturon ne havas. Unu la alian detruas tiaj kritikoj.

Kiel estus eble, ke lingvo vivu sen literaturo? Al vivanta lingvo ĝi estas ja necesa kiel la koro al vivanta homo. Literaturo estas por ĉiu lingvo la beliga centro, en kiun alfluas la sango por puriĝi kaj poste reflui en ĉiujn partojn de l' vivanta korpo. Lingvo ne povas esti laŭordone nur komerca kaj scienca.

Kiel povus iu malpermesi, ke troviĝu iuj homoj por paroli pli arte kaj pli zorge ol aliaj? En ĉiu homo kaŝiĝas iu deziro al beleco. Jam en prahistoriaj epokoj per pintaj pecoj de ŝtonoj la homoj provis skulptadi figuraĵojn sur la maldeklitaj mebloj, kiujn ili tranĉadis por si el la trunko de l' falintaj arboj. De belarto tio estis la humila komenco.

LINGVO-KVIZO.

Testu vian scion pri Esperanto! Klopodu trovi la respondojn pri ĉi-subaj demandoj:

1. Kiu vorto ne harmonias en la sekvanta vortserio? Fantaziulo, frenezulo, honestulo, inkmakulo, singardemulo, stultulo.
2. Kiuj Esperanto-vortoj finiĝas per aŭ?
3. Nomu dek Esperanto-vortradikojn kun la unusilaba sono aj.
4. Kio estas la diferenco inter la frazoj:
 - a) La instruistaj salajroj, kiuj estas tro malataj, estos plialtigataj.
 - b) La instruistaj salajroj kiuj estas tro malaltaj, estos plialtigataj.
5. Entjero estas: a. nomo de osto en la homa kruro. b. parto de fiŝkapta reto c. speco de anaso. d. ero de solvaĵo por brili objektojn. e. nefrakcia nombro.

La solvoj troviĝos en la sekvanta numero de „N.E.”.

Ankaŭ en parolo baldaŭ troviĝis artistoj, kiuj deziris kanti ritmitajn frazojn aŭ diri rakonton en ia pli bela maniero ol kutime. Kiel estus eble malpermesi, ke talenta homo skribu aŭ parolu en pli eleganta maniero ol lia najbaro, kiu uzas la lingvon nur por vendadi aŭ ordonadi per mallongaj rapidaj frazetoj?

Kiel oni povas malpermesi, ke ni, Esperantistoj, ŝatu kanti kune laŭ vortoj amataj?

Ja ĉio ĉi estas literaturo kaj ĉio ĉi okazas en plej natura maniero.

Amuzan kaj profunde instruan ekzemplon oni povas doni. Ĉe unu el la antaŭaj kongresoj de Esperanto hispana junulo enamiĝis je sveda junulino, bluokula kun orblondaj haroj. Post kiam la fermo de l' kongreso malproksimen vojaĝiĝis ambaŭ gejunulojn, ili kune korespondadis. Svedan lingvon li ne konis, nek ŝi la hispanan. Nur Esperanton ili havas komune. Sian amon la fervora junulo volis pli bele esprimi kaj flamantajn versajojn li ekverkis en Esperanto, la lingvo de ilia amo. Esperantajn poemojn li eble neniam antaŭe vidis, sed kiel skribi proze, kiam oni amas? Poemojn al ŝi li verkis

Kaj jen alia komenco de literaturo. Ĉu ankaŭ tion ĉi ni devus malpermesi?

(El la parolado de Edmond Privat okaze de la 7-a universala kongreso 1911).

„Aŭtomata Sekretariino”.

Laŭ la taggazeto „Het Parool” de 29-11-1963 d-ro P. C. Paardekooper, konata nederlanda lingvisto, batalas por plisimpligo de la nederlanda ortografio. Oni kalkulis, ke plisimpligita ortografio kaŭzus profiton de 16% ĝis 17% ĉe la tajpado, kompostado kaj tiaj okupoj. Kiam ni post 10 aŭ 20 jaroj havos „aŭtomatan sekretariinon”, la lingvo kun plej simpla ortografio troviĝos en privilegiita pozicio. Angla kaj franca havos gravan malavantaĝon pro siaj ege malmodernaj ortografioj.

La „aŭtomata sekretariino”, estas aparato, kiu rekonas parolitajn sonojn kaj fiksis ilin en tajpita teksto.

Konkludo de ni: ankaŭ Esperanto kun sia simplega ortografio havos grandan avantaĝon kompare kun aliaj mondlingvoj.

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”.

Prez.: S-ro H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 60, Utrecht.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.

Libroservo: Pythagorasstraat 122, Amsterdam-(O.). Poŝtĝirkonto: 7 69 15

Tel.: 0 20 - 5 13 79.

Biblioteko: S-ro E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.

Tel.: 0 30 - 3 43 90.

Asocia Kartoteko: S-ro Tj. Boersma, Borniastr. 95, Leeuwarden.

Informa Fako: S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem.

Mabesoone-Fondajo: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamingel 294, Groningen.

Poŝtĝirkonto: 81 58 89.

Gazetarservo: Frederikslaan 47, Schoorl (N.-H.).

Prizorganto Lingva Rubriko: S-ro S.S. de Jong Dzn., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.). Tel.: 0 51 57 - 91 46.

KONCIZE.

Esperanto en Indonezio. Por propagandi Esperanton en Indonezio la „Indonezia Esperanto-Instituto” eldonas novan broŝuron en la indonezia lingvo; tradukita la titolo estas: „Esperanto, ĝiaj strukturo, evoluo kaj progresado” (formato 16 x 12 cm., 32 pĝ.).

La broŝuro enhavas apartan instigan artikolon: Naŭ tezoj pri la azio-afrika lingvoproblemo. Tiu ĉi konvinka ĉapitro estas en 4 lingvoj: Esperanto, indonezia, ĉina kaj angla.

Mendu ĉi tiun broŝuron de supre menciita instituto ĉe s-ro Liem Tjong Hie, Dj. Gadjah Mada 60, SEMARANG, Indonezio. Prezo 2 intern. resp. kup. plus 1 resp. kup. por registrita sendo.

Subtenu la Esperanto-movadon en ĉi tiu grava azia lando!

KORESPONDPETOJ.

S-ino Janina Bogucka, Varsovio, ul. Kielecka 42 m 7 (juristino mezaĝa) pri soci-juraj problemoj, muziko, pri aliaj temoj.

S-ino Barbara Zdrojek, Varsovio 32, ul. Krasinskię 8 m 7, pri ĉiuj temoj, kolektas bildkartojn.

S-ino Kvirina Szopinska Varsovio 33, ul. Saska 60/2 (mezaĝa) pri lingvoj, literaturo, muziko, filmo, turismo, bildkartoj.

Boekenverkoper H. Veenstra heeft in voorraad Esperanto-woordenboeken van Van Straaten, in zeer goede staat; prijs 12,50 gld. per stuk.

Wegens opruiming 200 Esperanto-boeken tegen zeer voordelige prijzen

Boekenlijst op aanvraag.

Adres:

J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam.

44-jara sveda laboristo deziras korespondi kun nederlandaninoj pri literaturo, arto, religio, psikologio kaj Esperanto-movado.

S-ro Arne Bengtsson, Abybergsgatan 32, MÖLNDAL, Svedujo.

SKRIBA KURSO POR LA E-DIPLOMO

en kunlaboro kun la

Leidse Ondewijs-Instellingen

Informoj kaj aliĝoj nur pere de nia sekretariino:

S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15